# *nordfrancia esperanto-federacio*
# jarraporto 2006

**Membraro.** — En 2006 la Nordfrancia Federacio enkalkulis, unuflanke, **5 asociojn-membrojn** (Arras, Boulogne-sur-Mer, Dunkerque, Lille kaj Valenciennes), t.e. same kiom en 2004–2005, kaj, aliflanke, **172 fizikajn membrojn** (152 en 2005) : 30 el Arras, 10 el Boulogne, 36 el Dunkerque, 46 el Lille, 28 el Valenciennes kaj 22 izoluloj. Sed plu estas malekvilibro inter la du regionoj Nord-Pas-de-Calais (ĉ. 90 % de la membraro) kaj Picardie (ĉ. 5 %), pri kiu la Komitato atentas kaj strebas malpliigi.

**Administro.** — La 2an de Aprilo 2006 okazis la **federacia kongreso** en Oignies (Pas-de-Calais). Tiam disvolviĝis la membrokunveno duparte : unue diskutrondoj pri kunordigado, komunikado, instruado kaj kulturo/aranĝoj ; due plenkunveno por raporti, sintezi la diskutrondajn konkludojn kaj decidi.

La **Federacia Komitato** kunsidis en Oktobro 2006 en Lille kaj tiam decidis i.a., ke — pro la kelkfoja tropezeco de lernilaj elspezoj por kluboj — la Federacio laŭpete monkontribuos al la elspezoj de la asocioj-membroj por la lernilaro ekde la lernjaro 2006–2007.

La Federacio denove iniciatis kaj partoprenis la duan **Interfederacian Konferencon**, kiu kunigis responsulojn de la regionaj federacioj en la landa kongreso en Rennes por diskuti kaj interkonsenti pri aferoj propraj al la regionaj kaj lokaj movadoj. Tiu Konferenco celas pliintimiĝon, interŝanĝojn kaj harmoniiĝon de la diversaj federacioj. La tria Konferenco okazos en la landa kongreso de 2007.

**Komunikado kaj propagando.** — La Federacio daŭre eldonas sian ĉiutrimonatan revuon ***Norda Gazeto*** por ĉiuj siaj membroj ; paralele kvar kluboj regule eldonas proprajn revuetojn. Fine de 2006 en la informriĉa **federacia retejo** (*http://esperanto.nord.online.fr*) estiĝis esperantlingva versio, kiu baldaŭ enhavos ankaŭ turisman rubrikon. La Federacio aĉetis kaj disponigas pri komunikiloj eldonitaj de UFE kaj JEFO.

La diversaj kluboj partoprenis en multaj **neesperantistaj aranĝoj** : forumoj de la asocioj aŭ de la lingvoj, ekspozicioj, la stratbazaro de Lille, ktp. Ili organizis ankaŭ prelegojn en publikaj salonoj, en neesperantistaj asocioj kaj en lernejoj. La Federacio daŭrigis siajn rilatojn al la surlokaj politikistoj kaj oficialiuloj kadre de la oficialaj kampanjoj de UFE.

**Instruado kaj ekzamenoj.** — La diversaj kluboj organizis regulajn **dumjarajn kursojn** kaj inicajn staĝojn en klubejoj, lernejoj kaj universitatoj, kiuj kunigis pli ol 100 lernantojn.

Konforme al ĝia plurjara ekzamena politiko, la Federacio organizis **regionan ekzamensesion** en Valenciennes dum tuta dimanĉo la 11a de Junio 2006 : ĝi enkalkulis la unuajn tri gradojn, kaj akceptis 8 kandidatojn (unu el ili samtage trapasis la unuajn du gradojn) — sukcesis ĉiuj el ili. La Federacio estis decidinta ekde 2005 organizi la ekzamenojn laŭ nova, tre kontentiga sistemo interkonsentita kun FEI : la Federacio mem ricevas de FEI ĉiujn rezultojn kaj diplomojn, kaj tiel povas tuj statistiki kaj plusendi la rezultojn al ĉiu ekzamenito kun gratulletero. Plie, la Federacio pagas mem la ekzamenkotizojn de la kandidatoj-federacianoj.

**Kulturo kaj aranĝoj.** — Dum la 18a kaj 19a de Novembro 2006 okazis la ĉiujara **Eŭropa Rendevuo de Morbecque**, kiu sukcese akceptis centon da partoprenantoj el Francio, Belgio, Britio... ĝis Rusio. Tie disvolviĝis kvingradaj staĝoj, kantspektaklo de Helen Fantom (Britio) kaj prelego de ŝi pri la programo *Lingvolanĉilo*.

La kluboj havas oftajn kontaktojn kaj renkontojn kun la belgaj samideanoj de Courtrai, Solre-sur-Sambre, Charleroi, ktp. Ili akceptis plurajn **eksterlandajn esperantistojn**, kaj plurfoje tiam organizis publikajn prelegojn.

Fine, multaj federacianoj partoprenis esperantistajn kongresojn aŭ renkontiĝojn (francajn kaj eksterlandajn) kaj staĝojn.

**Venontaj projektoj.** — La Federacio celas daŭrigi siajn ĉi-supre diritajn politikojn pri varbado, komunikado, instruado, ekzamenoj, kulturo, kunlaboro kun UFE... Ĝia federacia kongreso okazos en Arras (Pas-de-Calais) la 30an de Septembro 2007, la venonta trigrada ekzamensesio en Lille aŭ Valenciennes en Junio 2007, kaj la Eŭropa Rendevuo de Morbecque en Novembro 2007.

La venonta **federacia kongreso** en Arras verŝajne eniĝos en la oficialan programon 2007 de la

« Departementa Jaro pri Pollando » amplekse festota de la departementa konsilio de Pas-de-Calais. En ĝi okazos planto de Esperanto-arbo kaj spektakloj. Paralele prezentiĝos ekspozicio pri Esperanto en IUFM en Arras. Tiu federacia kongreso estos speciala : tiam stariĝos nova Federacia Komitato, kaj ĉi tiu publike tuj balotos la novan Estraron por la mandatperiodo 2007–2010.

Fine, post la festo de la centjariĝo de la unua Universala Kongreso, la Federacio nun prepariĝas por dece festi sian propran **centjariĝon en 2008** kun i.a. eldono de sia centjara historio kaj de nova(j) bild-rakonto(j), kaj supozeble speciala, dutaga kongreso.

*Raportis : Xavier Dewidehem,*
*prezidanto de la Nordfrancia Esperanto-Federacio*